

Viv-periodoj favoraj al la lernado de esperanto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-813/272, k39, 1979 majo 10, 12

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La 31-an de marto okazis en Berno kolokvo pri la instruado de esperanto. Por ĝi mi pretigis tezon. Unu el ili pritraktas la temon "Viv-periodoj favoraj al la lernado de esperanto." Ni esperantigis ĝin por vi.

A.- Nenia enketo statistikas pri la esperantoparolantoj: kiam, kiel kaj kial ili lernis esperanton kaj kiaj estas la psikologiaj konsekvencoj de tiu ĉi lernado.

Cl.- Per sondadoj estas tamen eble akiri proksimuman ideon pri la svisa situacio. Ili kondukas al kelkaj konstatoj, kiuj meritis esti konfirmitaj aŭ malkonfirmitaj kaj precizigitaj en la kadro de sociologia enketo.

A.- La plimulto de la esperantoparolantoj lernis la lingvon laŭ persona maniero. Ili estas aŭtodidaktoj. Forta malplimulto frekventis privatajn kursojn. Eta malplimulto akiris la lingvon pro familia praktiko kaj konsideras esperanton kiel gepatran lingvon. Fine, etega malplimulto lernis esperanton lerneje en la kadro de instruado nedevisa aŭ eksperimenta.

Cl.- Statistike oni alvenas al tiuj ĉi proksimumaj procentaĵoj: Aŭtodidaktoj: 70 procentoj. Privataj kursoj: 20 procentoj. Familia lingvo: 7 procentoj. Lerneja studado; 3 procentoj.

A.- En ĉiuj ĉi situacioj vola ago estas necesa. Fakte la privataj kursoj superas malofte daŭron de 20 lecionoj duhoraj, tio estas kvardekhora kolektiva studado. La familio permesas nur parolan praktikon de la lingvo. La nedevisa instruado proponata de kelkaj lernejoj estas ofte tre limigita horare (maksimume duonhoro aŭ unu horo semajne) kaj tempe (ĝenerale unu lerneja jaro). Ĉiuj nuntempaj esperantoparolantoj akiris pro tio grandan parton de siaj konoj per persona laboro.

Cl.- Evidente ekzistas vivperiodoj pli favoraj ol aliaj al la lernado de esperanto. Ankaŭ ĉirilate mankas statistika priskribo. Tamen estas eble aserti, ke la privilegiitaj aĝoj estas, en la infaneco inter 10 kaj 14 jaroj, en la adoleskeco inter 18 kaj 21 jaroj, por la plenkreskuloj inter 35 kaj 45 jaroj kaj fine la komenco de la emeritiĝo. Tiurilate kelkaj konstatoj estas interesaj.

A.- Ŝajnas, ke esperanto, pro siaj strukturoj regulaj kaj ĝeneraligaj, lingve respondas al penssinteno propra al la infanaĝo. Tial la infanoj, kiuj hazarde kontaktiĝis kun la lingvo, ĝin lernas kun multe da entuziasmo, sen necese fiksi al si precizan celon. La malkovro mem ilin interesas.

Cl.- Malkresko de la intereso por esperanto paralelas al la eklerno de fremdaj lingvoj. Sed multaj gejunuloj ĉirkaŭ la 18-a jaro eksentas malkontenton. Ili havas la impreson, ekzemple, ke al la streĉo por la asimilado de la germana aŭ angla lingvoj ne respondas la atendita rezultato. Tiam se ili renkontas esperanton, ili kapablas ĝin ekparoli post kelkaj tagoj de intensa studado persona, precipe se ili havas precizan celon, kiu ĝenerale estas la serĉado de kontaktoj kun gejunuloj el aliaj landoj.

A.- La eniro en superajn studojn, la profesia vivo kaj la edziĝa fazo kun la kreo de familio markiĝas per malkresko de intereso por esperanto. Sed poste, inter 35 kaj 45 jaroj, multaj plenkreskuloj sentas la bezonon plilarĝigi sian horizonton; iliaj nuraj profesia aktiveco kaj familia vivo ĉesis ilin komplete kontentigi. Ofte, konsciaj ke ekzistas en la mondo interlingva problemo, ili ekstudas esperanton pro idealo. Ŝajnas ke ĉirkaŭ la 45-a jaro tiu ĉi bezono ĉesas aŭ ke en tiu ĉi aĝo la plenkreskuloj fine remodlis sian personecon akirinte novan mensan ekvilibron. Ekkontaktante esperanton ili tiam tendencas prokrasti la lernadon de tiu ĉi lingvo ĝis la emeritiĝa aĝo, sentante ke ilia vivo ĝis tiam estos sufiĉe plena.

Cl.- La studo de esperanto, kiu koincidas kun la ekemeritiĝo – ofta okazaĵo - duobliĝas de bezono povi partopreni kursojn, renkontiĝojn, vojaĝojn, ktp. Tiuj ĉi personoj restrukturas sian ekzistadon por redoni al si devojn kaj precizan vivprogramon. Ili klopodas por integriĝi en societon, kiu estas al ili akceptema.

A.- Koncerne la psikologiajn konsekvencojn de la lernado de esperanto ankaŭ nenia studado efektiviĝis. Tial nur pri kelkaj konstatoj sufiĉe frapaj kaj ĝeneralaj oni povas raporti, lasante al estontaj observadoj la taskon ilin konfirmi aŭ malkonfirmi kaj ilin klarigi.

Cl.- Estas okulfrape ke la lernado de esperanto je la aĝo plenkreskula ne havas la saman psikologian gravecon ol kiam ĝi efektiviĝas en la infaneco kaj adoleskeco.

A.- Inter tiuj, kiuj havis la okazon lerni esperanton antaŭ aliaj fremdaj lingvoj, ĉiuj pli poste unuanime asertas, ke ilia dulingveco - lingvo gepatra kaj esperanto - signifis por ili aprezindan ne-neadeblan avantaĝon super iliaj kamaradoj dum la studado de la lingvoj fremdaj kaj klasikaj kaj ke esperanto vekis ĉe ili intereson por la lingvoj kaj respekton pli profundan por la gepatra lingvo. Pierre Bovet, en sia enketo pri la instruado de esperanto en la lernejoj, jam atentigas nin pri tiu pozitiva influo de esperanto.

Cl.- Estas konstateble, ke la granda plimulto de la esperanto-verkistoj kaj de la gvidantoj de la esperanto-movado estas fakte personoj venintaj al la lingvo antaŭ sia maturiĝo. La junaj esperantoparolantoj, ŝajne, plenumas siajn studojn aŭ metilernadon kun priokupo, kiu karakterizas ĉiun dulingvulon. Ili sentas sin koncernataj unuflanke kiel fanc-, german- aŭ ital-parolantoj, sed ankaŭ aliflanke kiel esperantoparolantoj. La elekton de iliaj studoj, de iliaj profesio kaj eĉ de ilia edzo aŭ edzino markos tiu ĉi dulingveco, kiu orientas iliajn interesojn kaj priokupojn. La lernado de neniuj fremda lingvo tiel profunde influas la psikon. Jen ni tuŝas unu el la misteroj de la dinamismo de esperanto.

A.- La plenkreskuloj, venantaj al esperanto, ĝenerale jam elektis la vivcelojn kiuj ilin karakterizas. En la praktiko de esperanto ili serĉas, antaŭ ĉio, plivastigon de la propra agadkampo profesia, religia, filozofia, kultura, aŭ eĉ rifuĝejon en mondo idealigita. Ili rezervas al la esperanto-praktiko precizajn kampojn en sia vivo familia kaj profesia. Oni komprenas, ke la lingvo kaj ties movado ne havas sur ilin same profundan influon, kiel sur tiuj, kiuj venas pli junaj al esperanto.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis pri la vivperiodoj favoraj al la lernado de esperanto gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!